

-18, u *Novo Dnu. Buzova*
Novo Dnu. Buzova

p. 17

gr. 13

bulgara esperantisto

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO
Rekomendita de la M-rio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

JARO XXI

SOFIA

15 FEBRUARO, 1941

8-9-10

El la ĝenerala ekspozicio de la Bulgara
pentrista asocio



P. Morozov

Junaj turistoj

Bulgara Esperantisto antaŭ la nova jaro

La Esperanto-movado en Bulgarujo efektiviĝis gravajn sukcesojn dum la lasta jardeko. Ne nur la nombro de la esperantistoj kaj amikoj de Esperanto multobliĝis, sed ankaŭ ilia spirita kvalito procente pliboniĝis. Hodiaŭ miloj da bulgaroj parolas, legas aŭ lernas nian lingvon kaj la kultura nivelo de la esperantaj grupoj estas relative tre alta. Nia movado malrapide sed ĉiam pli kaj pli sisteme unuigas la intelektajn masojn de la bulgara socio. La esperantistoj baldaŭ fariĝos kulturaj gvidantoj de nia popolo. Pioniroj de nova civilizacio, ili nun ludas rolon similan al la rolo kiun plenumis dum la pasinta jarcento la tiel nomitaj „verkantoj“ de la bulgara nacia renesanco: Paisij, Sofronij, Levski, Rakovski, k. c.

Jam sole tiu ĉi cirkonstanco necesigas la eldonon de pli ampleksa, pli regula kaj pli zorge redaktata periodaĵo. „Bulgara Esperantisto“ devas adaptiĝi al la nova stato de nia movado en Bulgarujo. Sed ankaŭ alia fakto estas konsiderinda. La milito kreis novan situacion en la esperantista mondo. La aperado de multaj, eĉ plej gravaj ĵurnaloj kaj aliaj periodaĵoj ĉesis. Ĉesis ankaŭ la eldonado de esperantaj libroj. La landlimoj estas fermitaj kaj la trafiko de presaĵoj fariĝis tre malfacila. Niaj multnombraj samideanoj riskas trovi nenian esperantan legaĵon. Hodiaŭ „Bulgara Esperantisto“ restas preskaŭ la sola esperanta periodaĵo en Bulgarujo.

Tamen ĝi devas plenumi la taskon ne nur de loka bulteno, sed de ampleksa idea, literatura kaj kultursocia revuo, donante interesan kaj sufiĉan legaĵon al ŝiuj bulgaraj samideanoj kaj eĉ al tiuj eksterlandaj esperantistoj, kiuj ne povas ricevi aliajn librojn kaj gazetojn.

Ni, bulgaroj, havis la enviindan sorton resti ekstere de la milita konflikto. Tiu ĉi favora situacio donas al ni apartan lokon en la eŭropa esperantista movado. Al nia pacinsulo estas direktitaj la rigardoj kaj la esperoj de multaj samideanoj en kies landoj nia lingvo kaj nia afero estas en danĝero. „Bulgara Esperantisto“ fariĝos iel neoficiale ankaŭ ties revuo kaj devas pravigi iliajn esperojn.

Ni vokas ĉiujn verkemajn amikojn al laboro por la pliperfektigo de nia revuo. Sed precipe ni vokas ĉiujn bulgarajn esperantistojn al laboro por pli granda disvastigo de ilia oficiala organo, por la multobligo de ĝiaj abonantoj kaj por la diskonigo de ĝia enhavo en lokaj nacilingvaj periodaĵoj kaj kultursociaj medioj.

Se nia voko ne restos sen efiko, dum la kuranta jaro la redakcio faros ĉion, kio dependas de ĝi, por ebligi la regulan aperadon de „Bulgara Esperantisto“ kaj por plibonigi ĝian formon kaj ĝian enhavon. Ni ĉiuj do streĉu niajn fortojn por doni al nia revuo amplekson kaj aspekton indajn por ĝia destino.

„Ĉiu speco, kies nombro estas malmulta, havas pli grandan verŝajnon esti ekstermita ol tiu, kiu posedas pli grandan nombron da individuoj“. — Darwin, Deveno de la specoj.

La ideaj movadoj estas kiel la vivantaj organismoj.

P. K. JAVOROV

HAJLO

„Jen unu, du kaj tri — frenezaj
kaj memorindaj jaroj . . . Dio,
vi levis viajn manojn pezajn
kaj punis nin pro peko morta.

Ĉu povas iu
esprimi mizerulan sorton,
ja kvankam ĝi hieraŭ estis?
Alvenu mort', alvenu pesto,
sed ne malsato sur la tero,
nek sufero!

Nu ve! — nin batis hajlo ega,
post ĝi — torento nin fortrenis,
kaj prujno brogis, kaj sekego.
Rostiĝis en la ter' la greno . . .“

*

Sed pasis vintra neĝa tempo,
foriris ankaŭ pluvprintempo
kaj la somera arda sun'
orumas verdajn kampojn nun.
Jam maturiĝas kampo grena,
spiketo pezas sin klinante,
kaj la espero konsolanta
ĉe vilaĝan' labora venas.
Ekvarmas ĝojo en la koro,
sur la visaĝ' ridet' ekfloras,
kuniĝas fingroj, kaj pro dank'
krucsignas pie dura man':
„Se dum semajno tiel tenos
varmego kaj ne malboniĝos,
la peza ŝarĝo faciliĝos,
kaj fino de l' ĉagrenoj venos“.

*

Ĝis kiam fort' ne mankas,
senlace vilaĝan' laboras . . .
Ripozo — he, dum vintro blanka.
Neekdorminte, jen, fervora
leviĝas antaŭ kokokrioj
kaj antaŭ hunda bojo — nura
li sur piedoj . . . „Gudron, ŝnurojn,

Ĉu, edzo, vi aĉetis?“ Scias
edzino fruvekema — pretas
jam ĉio, sed ŝi redemandas,
ĉar ŝia koro malkvietas —
ja morgaŭ estas la rikolto!

Kaj kolerante
por io, kuras en la korton
kaj en la ĉelon sin reŝovas,
serĉadas . . . „Mi, edzin', tuj trovos
sep rikoltistojn — do toleru.
Hej, Joĉjo, dormemul', vekigu!
Ĉielo ruĝa bonveteron
anoncas, suno jam leviĝas,
malsata la bestar' atendas“.

Malantaŭ la remiz' dormeme
oscedas Joĉjo kaj eksentas,
ke Sivĉjo lekas lin ŝerceme
per naz' malseka sur koleto.
„Hej, saltu!“ krias riproĉante
la patro el la kort', frapante
sur veturilo najlon. „Pretu!“ . . .
El la najbara kort' — kverelo,
insulto kaj tumulto granda.
Proksime svingas vir' martelon
kaj la ambos' al ĝi rekantas.
Jen ekblovetas vent' matena
kaj sonorila tint' alvenas
vilaĝen; ie ŝafoj blekas . . .
Viv' komenciĝas ĉie, brua.
Kaj jam la suno brilas, seka,
kaj sur la teron fajro fluas.


*

Jam posttagmez'. Sufoka ardo.
Kaj ĉiu levas timrigardon,
forviŝas frunton per maniko
kaj vidon en ĉielon pikas.
Ĉiel' griziĝas, nebuliĝas.
La suno en koler' flaviĝas:
elsude nubo — pufa drako —
leviĝas, rampas, surde krakas.
Kaj pluen nigras jen aliaj . . .
Nu, aŭdu! Signo! kokokrioj!
Do kial preter la rivero

flugilojn svingas la anseroj,
 kaj kial ili stulte krias?
 Ĉu ili plugis, semis ion?

*

Foriru, nuboj malfidela,
 atendu, domaĝul' kruela,
 semajnon, du . . . ho timigilo!
 Sed nuboj rampas, kreskas, vila,



G. Savov

Draŝejo

malhela korpo serpentumas,
 forglutas sunon; for mallumas
 minace . . . Ve, kompat' ne venas!
 Kaj plago granda realpaŝas.
 Sin ĉio sub azilon kaŝas,
 la koro tremas, time svenas,
 ĉar supre — fulmo, bru', perturbo.
 Turnvento, polvo . . . Horizonto

ŝiriĝis kaj bruliĝas — kurbo
 brilega — ree — Dio! . . . Tondro
 eĥiĝas montojn, kampojn — tero
 skuiĝas febre . . . Hajlo! — eroj —
 jen nukso, ovo . . . Ho, ne batu . . .
 Laboron sangan, Di', kompatu!

*

Finiĝis. En la firmamento
 surdiĝas lasta tondro time
 kaj — lup' post ŝafoj — frosta vento
 forpelas nubojn malproksimen.
 Kaj suno rebrilanta, muta
 rigardas svene: longa aro —
 maljunaj, junaj kaj idaro —
 sin trenas la vilaĝo tuta.
 Kaj ĉiuj nudpiede rampas,
 kun grizaj vangoj pro sufero,
 eterna ŝarĝo ilin puŝas
 al surdezertaj grenaj kampoj.
 Tritik', horde', sekalo kuŝas
 jen nematuraj, jen maturaj,
 ĉar tie rikotist' terura
 rikoltis frue flor-esperojn . . .

— — — — —
Tradukis: Steki.

Niaj antaŭstarantaj taskoj

La homaro travivas nun kaj travivos ankoraŭ dum kelkaj jaroj — tragedion teruran. La konfliktoj en nia ekonomia vivo, kiuj trenas konfliktojn en la socialpolitika kaj kultura vivo, rezultigis malkonfidon kaj malamon inter la homoj, malsaton kaj fine militon inter la popoloj.

La nuntempa milito estos pereiga por la homara kulturo. Multajn materiajn kaj spiritajn bonojn kaj valorojn, kreitajn dum jarentoj per la penoj, la ŝvito kaj la sango de milionoj da homaj estaĵoj, detruos la milito.

Esperanto perdis kaj perdos multon ĝiskiam daŭros la milito. Ni jam sentas

kortuŝe la neniigitajn poziciojn de la Esperanto-movado en kelkaj landoj.

La momento estas kritika por ĉiuj esperantistoj kaj Esperantoj-organizaĵoj.

Sed ni ne malesperu. Nome en la nunaj danĝeraj vivkondiĉoj al ni antaŭstaras pezaj kaj seriozaj taskoj. Ni devas streĉi ĉiujn niajn fortojn kaj almarŝi senhezite ĝis la fronto kie ni defendos la kaŭzon de la esperantismo. Ties devizo estas: homamo, paco, lumo.

Ja nia Majstro kreis la internacian lingvon, kaj ĝin donis al ni kiel rimedon, kiel armilon en nia batalo kontraŭ la detruo kaj kontraŭ la fradmortigado.

Ni estu optimistoj kaj pretiĝu por batalo. Kaj ni estu certaj, ke en la inkubo de nia nuntempo ni ekvidos la disruĝigon de la homa horizonto, sur kiu aperos la brilantaj radioj da la verda stelo.

Nia konkreta laboro, miaopinio, devas sekvi jene:

1) La leĝigitaj Esperanto-societoj devas daŭrigi sian laboron, organizante esperanto-kursojn, publikajn kunvenojn, prelegojn k-t-p.

2) En lokoj, kie ekzistas malfavoraj kondiĉoj por fondo de Esperanto-societo aŭ kurso, ĉiu bona esperantisto devas celi la ĉiudirektan disvastigon de Esperanto kaj varbi apartajn adeptojn por nia movado. Ĉiu esperantisto devas instrui Esperanton al siaj ĉirkaŭuloj, ĉu individue, ĉu en rondo amika, unuvorte, li entusiasmigu, instigu kaj kontrolu la aŭtodidaktan lernadon de la novuloj.

3) Ni ĉiuj pagu la abonon de „Bulgara esperantisto“ kaj estu regulaj mem-

broj de la lokaj societoj aŭ de la landa asocio. Ĉiu esperantisto varbu almenaŭ unu novan abonanton de „B. E.“ aŭ anon de B. E. A. Tiamaniere ni helpos la financbezonojn de la asocio mem.

4) La internacia korespondado ne nur ne devas ĉesi, sed ni devas plioftigi kaj plivastigi ĝin.

5) La asocio aperigu ĉiumonate regule la organon de la bulgaraj esperantistoj. Ĝiaj paĝfakoj kaj materia kaj idea enhavo estu plibonigitaj. Kiel modelo, kiel tipo, rilate la presaranĝon de „B. E.“ ni konsideru la numeron de decembro 1938 j.

Nur per laboro laŭplana kaj konstanta ni defendos la kaŭzon de Esperanto en nunaj malfirmaj tagoj. Tiel ni travivos la nuntempan koŝmaron kaj atingos la plenan triumfon de nia esperantista ideo.

Vasil K. Belĉev

Pernik.



N. Petrov

Patro kaj filo

Al la morto de l'Majstro

Krakad' terura,
 fulmtondroj, kanonad';
 ĥaos' ebria kaj infera,
 hombuĉoj kaj suferoj,
 atako post atak'.

Flamegoj, cindroj,
 tempesto kaj kartoĉ';
 en sinforĝes' — homaro,
 la mond' barbara —
 en sangdiboĉ'.

Ne eltoleris,
 profunde ektuŝita
 de l' barbereco fia
 de l' mond' ebria,
 kaj afliktita,
 kaj frakasita
 ĝi krevis —

l' amanta kor'
 de l' Majstro nia,
 la hom' genia,
 simbolo de l' paco, —
 post vivo laca
 en lasta hor'.

Kaj larmojn ekruĵis
 ĉagrenaj okuloj,
 milmilojn da koroj,
 penetris doloro:

la pacon amantaj
 bonkoraj revantoj,
 la malfeliĉuloj
 en sangaj makuloj,

kaj la batalantoj
 kuraĝaj kaj bravaj
 por hela estonto.

Kaj nun —
denove fum',
denove morto kaj danĝer',
denove barbareco kaj mallum',
denove regas la malver'.

Kaj nun .
militfantom'
rikanas ree kun malic',
nun ree fajra, morta vom',
nun ree por detruo vic'.

Ni ĵuras ĉe la tomb'
de nia Majstro kun fidel',
ke ĝis la lasta fort',
aspiros vigle al la cel'.

Zefiro



N. Georgiev

Siringo

JORDAN JOVKOV

LUKTO ĜIS MORTO

Post epifanio ekestis rigora vintro. La neĝo brilis kiel vitro sub la palaj radioj de la luno. Aŭ la ĉielo remalheliĝis kaj ekfalas era neĝo, kiu kvazaŭ ne falis al la tero, sed turniĝis en la aero. Senviva kaj sensona ŝajnis la blanka ebenaĵo, kvazaŭ ĝi estis dezerto. Kaj jen meze de la vento kaj la neĝblovo oni ekaŭdis luphurlon, solecan, ploreman, terurigan. Tiu-ĉi hurlo laŭtiĝis, traehis potence kaj sangavide kaj tuj ĉesis. Post mallonga silento la hundoj ekbojis por kuraĝigi sin — tion ja ili ĉiam faras, ekflarante la lupaĉon.

Laŭ la postsignoj, kiujn ĝi faris sur la neĝon, laŭ la hurlado kaj la granda timo de la hundoj, oni povus konjekti, ke la lupo estas nekredible granda, ke ĝi estas ne lupo, sed lupego.

— Venis la reĝo de la lupoj, diris Petro, la paŝtisto. — Mi vidis ĝiajn postsignojn — ili estas grandaj kiel mia mano, kiel la postsignoj de bubaletoj. Mi asertas, ke ĝi estas solulo.

— Kion signifas la vorto „solulo“? — demandis Vasilo, kiu ne konis la vivon de la lupoj kaj pro tio li ne maltrankviliĝis.

— Ĉu solulo? Jes. La solulo estas... ekzemple, se lupino naskas tri aŭ kvar lupidojn, sed preskaŭ ĉiuj formortas, kaj restas vivanta nur unu el ili. Tiu ĉi lupido suĉas la tutan lakton de sia patrino kaj tre grandiĝas. Plenkreskinte, tiu lupo ĉiam vagas sola kaj, kiel oni diras, ĝi ne serĉas kunhelpantojn. Malbona lupaĉo! — dentpremis Petro kaj alrigardis la neĝan kampon. — Sed mi diru al vi, Vasilo, mi ne timas, ĉar la anadolano ne cedos al ĝi — aldonis Petro viglignite kaj ekridis.

La anadolano aŭ „Paŝa“, kiel li nomis ĝin, estis la plej bela hundo de Petro. Ĉi estis granda, kun nigra haroriĉa vosto kaj kun pendantaj oreloj, similaj al la oreloj kaj al la haroj de la karakaĉanaj hundoj. La anadolano ne similis al la aliaj hundoj. Antaŭ ĉio, ĝia marŝmaniero estis iom stranga. En bonhumoro la hundoj trotetas kutime kun hirte volvita vosto. La anadolano paŝas malrapide kiel urso,

rigardas malsupren kaj, pro la movo de la marŝado, ĝia kapo balanciĝas jen dekstren, jen maldekstren. Ĝia rigardo estas memfida, fiera. La aliaj hundoj estis afablaj kun Petro. Ili ludis unu kun la alia, dume iliaj okuloj gaje lumis kaj sulkoj reaperis ĉe iliaj faŭkantaj buŝoj, pro kio ŝajnis, ke ili ridas. La anadolano sin tenis grave, ne rekonis karesojn, ĝi estis serioza kaj nealirebla.

Eĉ tage, kiam la alblovo de la vento flarigas al ili la odoron de lupo, la hundoj eksltas, kvazaŭ vespo ilin atakas, kaj ekbojas. La anadolano ne maltrankviliĝas kaj, kuŝante, kaplevas, flaras la aeron kaj murmuregas obtuze — kvazaŭ oni aŭdas fulmotondron el malproksime. Poste ĝi kuŝigas la kapon inter siaj piedoj, sed ĝiaj okuloj flaras kaj vigle priatentas ĉion.

La lupo hurlis kelkajn noktojn seninterrompe, ĉirkaŭiris ŝajne preter la farmo, sed ĝi ankoraŭ ne kuraĝis ataki. Malgraŭ tio Petro pretiĝis por renkonti ĝin. Kun ruĝa, brunigita vizaĝo, kun kaprohara pantalono, kun du peltoj unu sur la alia, la tuta, de la kapo ĝis la piedoj, en felo kaj kovrita de haroj kiel eskimo, li purigis sian montenegran pistolon, riparigis ankaŭ la palisaron, iom difektitan. Vespere li zorge kunvenigis la ŝafojn en la ĉambron kaj li mem kuŝis sur la sojlo pro timo, ke la lupo surprizos lin. La anadolano kaj la aliaj hundoj restis ekstere de la ĉambro.

Faladis era, senbrua neĝo. Oni jam ne aŭdis la hurlon de la lupo kaj Petro iom kvietiĝis. Lun vesperon li eliris por ĉirkaŭiri la farmon. La neĝo grincis sub liaj glaciigintaj laĉsandaloj. Jen li vidis, ke la ĉevalinoj el lia grego kunariĝis kaj spiregis. La hundo ruliĝis en la neĝon antaŭ ili kaj ŝajnis sin afabla. Petro ne priatentis ĝin, revenis, kuŝiĝis en la ĉambro. Ekstere apud la palisaro kuŝis multaj ŝafoj, sed Petro ne enĉambrigis ilin. La lupon oni ja ne aŭdis plu.

Li dormis ankoraŭ la unuan dormon — la ŝafoj alkuris kaj vekis lin. Li mal-

fermis la okulojn kaj kvazaŭ rigidiĝis: la granda lupo (ĝi ŝajnis al li granda kiel azeno) kun faŭkanta ruĝa buŝo postkuris la ŝafojn tra la ĉambro kaj mortigadis ilin. La palisaro ekkrakis, io simila al pilko alkuris kaj jen la lupo ekstaris sur siaj postaj piedoj kontraŭ alia ruĝa buŝo kun terurigaj dentoj. La anadolano estis alkurinta. Oni aŭdis murmregon, kvazaŭ iu rompis katenojn. La lupo kaj la hundo luktis starigite, tenante sin brusto ĉe brusto. La makzeloj ekklakis kiel tenajlo, la lupo transsaltis la palisaron, la hundoj postsekvis ĝin. Petro rekonsciiĝis, ekkriis kaj pafis. La lupo mortigis sep ŝafojn, mordis ankaŭ kelkajn. Sed nur tio-ĉi ne estis la perdo. Matene, reviziinte la ĉevalgregon, oni vidis, ke la naztruoj de juna ĉevalino estas disŝiritaj kaj malantaŭe sur la kokso faŭkis alia granda vundo. Apenaŭ tiam oni konjektis kaj komprenis, kian hundon Petro vidis hieraŭ vespere: ĝi ne estis hundo, sed lupo. La lupoj uzas tian ruzon: ili kuŝiĝas, ruliĝas, ŝajnigas sin aŭblaj. Kaj pro neforigebla scivolemo iu juna ĉevalino aliras por vidi ilin, por flari ilin. Tiam la lupoj eksaltas kaj ekmordas ĝiajn naztruojn. Nia lupo faris la samon. Estante granda kaj forta, tiu malamiko ŝajnis esti ankaŭ ruza.

Nun Petro fidis nur la anadolanon. Li nutris ĝin bone per milia kaĉo, ĵetis al ĝi pecojn da pano, kiujn la anadolano buŝkaptis, simile al pilkludanta infano. Rigardante ĝin, li sentis plezuron: hirtiĝinta, kun stariĝintaj densaj haroj, superŝutita de neĝo, kun fajraj okuloj kiel du brulantaj karboj, ĝi marŝis kaj skuis la kapon, fiera, furioza, forta kiel leono.

— Estu forta, Paŝa! — diris al ĝi Petro. — Estu forta kiel viro!

Ne timante, la anadolano agis senpripense. Iun nokton la hundoj ekbojis kaj Petro eliris eksteren. Sendube la lupo revenis. Subite la flava hundo alkuris sekvite de l' aliaj, kaj post iom da tempo, ne eligante eĉ sonon, la anadolano alkuris post ilin. Pro la bojado oni konjektis, ke la hundoj tre malproksimiĝis. Subite oni aŭdis terurigan tumulton — bojadon, murmuregon, krion — kaj ĉio kvietiĝis. Post iom da tempo la anadolano revenis, kaŭriĝis kaj eklekis siajn vundojn. La aliaj hun-

doj revenis ankaŭ, sed la flava hundo mankis. La lupoj manĝis ĝin.

La sekvantan tagon Petro trarigardis atente la postsignojn kaj konkludis, ke tiun ci fojon la lupoj estis multaj. Iu lupo allogis la hundojn, ŝajnigis sin fuganta kaj altiris ilin. La aliaj lupoj alkuris kaj ĉirkaŭis ilin. Tiel pereis la flava hundo. Inter la postsignoj Petro rekonis ankaŭ la postsignojn de la granda lupo.

— Ankaŭ ĝi estis tie-ĉi. Ĝi estas ilia ĉefo! — Diris al si Petro.

La anadolano savis sin, ĝi savis ankaŭ la aliajn hundojn. Estis evidente, ke de tago al tago ĝi estiĝis pli sentima, pli kruela. Ankoraŭfoje dum la plenluno Petro vidis ĝin lukti kun la lupo. Du-tri fojojn ili interrompis la lukton kaj rekomencis. La anadolano jam superis la lupon.

Sed la vintro daŭris. Freŝaj neĝeroj faladis ofte. Ĉiuj bestoj malsatiĝis kaj aliris la vilaĝojn. Matene oni vidis sur la freŝa neĝo la postsignojn de perdrikoj, de leporoj, de vulpoj. Kaj iom flanke, en la malproksimo de la kampo, estis la soleca vojeto kaj la grandaj postsignoj de la lupo.

La noktoj malheliĝis, ankaŭ nebulo ekkuŝis. Petro kunvenigis la ŝafojn en la ĉambron, kaj li mem, kiel antaŭe, kuŝis ĉe la sojlo de la pordo. Li ne vidis jam la lupon, sed li sciis, ke ĝi venas: li aŭdis murmuregon, li aŭdis dentklakojn, la hundoj bojis, kvazaŭ ili estis brogitaj. La alian tagon Petro trarigardis la postsignojn sur la neĝo. Li estis kontenta, ridetis: pli malproksimen translokiĝis la postsignoj de la lupo. La dentoj de la anadolano forpelis ĝin, preteririgis ĝin.

— Vasil, ĉi-nokte la lupo preteriris vian fenestron, — gaje diris Petro.

— Ĉu ĝi preteriris? Mi ne scias.

— Ĝi preteriris, sed ĝi ne kuraĝis alproksimiĝi. La anadolano devigis ĝin foriri.

Reveninte, Petro donis iom da pano al la anadolano.

— Bravo, Paŝa, bravo: — diris li kaj rigardis ĝin ravite.

Laŭ lia opinio la hundo estis teruriga bone nutrita, kun larĝa ronda dorso, kun:

furiozaj okuloj. Ĝi apenaŭ rigardis Petron, kvazaŭ ĝi ne konis lin.

— Ĝi ankaŭ estas sovaĝbesto! ĝi ankaŭ similas la lupon: diris al si Petro. Kompreninte, ke la lupo estas jam venkita, li volis ankaŭ neniigi ĝin. Li deĵoris nokte kun pafilo en la manoj, sed la lupo ne venis. Kiam li deĵoris, la lupo ne venis, sed tuj kiam li enhejmiĝis, la lupo revenis. Tiam Petro trovis malnovan lupkaptilon kaj metis ĝin sur la vojon de la lupo. Nun la lupo ne preteriris la fenestron de Vasil, sed, renkontite de la anadolano, deflankiĝis, ekiris tra la vojeto kaj transsaltis la profundan fosaĵon, kiu ĉirkaŭbaras la ĝardenon. Tie oni estis metinta tabulon anstataŭ ponto tamen la lupo ne paŝis tra ĝi, sed ĝin transsaltis de la unua bordo al la alia. Petro metis la lupkaptilon tien, kien la lupo ne ĝeniĝus meti siajn antaŭajn piedojn. La lupkaptilon li ligis per kateno al fajro-paliso bone kaŝita.

Kvazaŭ fatale tiun-ĉi nokton Petro dormis profunde. Dormante li aŭdis du-tri fojojn la murmuregon, li eĉ diris:

— Ili luktas tro longe.

Tamen li ne leviĝis.

Je krepusko li alkuris la fosaĵon kaj konsterniĝis: ne la lupon kaptis la kaptilo, sed la anadolanon. Kaj ĝi estis morta, rigidiĝinta. Granda vundo faŭkis sur ĝia gorgo, kvazaŭ ĝi estis mordita. Ĝia sango ruĝigis la neĝon.

Petro komprenis la okazintaĵon: la hundo kaj la lupo luktis kaj baraktis tutan nokton. Oni vidis sur la neĝo alian sangan postsignon kiu kondukis al la kampo. Petro postiris ĝin, faris kelkajn paŝojn kaj fiksitis rigardon en la krepuskon: ne tre malproksime li rimarkis la lupon. Ĝi ne kuris, ne marŝis, sed apenaŭ moviĝis. Farinte unu-du paŝojn, ĝi falis, provis ekstari sed refalis. Ankaŭ ĝi perdis la lastajn fortojn, ankaŭ ĝia sango forfluis...

Konsternite de tio, kion li vidis, Petro revenis rapide en la farmon por sciigi ĉion al Vasil. La neĝeroj ludis en la aero antaŭ li, frapetis lin sur la vizaĝon, eniradis en liajn okulojn.

El bulgara lingvo tradukis:

G. H.



Esperanto—kurso en Plovdiv; gvidanto P. Kamburov. La gekursanoj deziras korespondi.
Adreso: Magda Iv. Bataklieva — 52 str. Gladston—Plovdiv.

BULGARA POPOLKANTO

ED - ZIN' I-RAS - ED-ZIN' I-RAS TRA L'AR-

BA-RO VER - DA DUM ŜI I-RAS

DUM ŜI I-RAS ŜI MAL - GA - JE PLO-RAS

Edzin' iras, edzin' iras tra l'arbaro verda.
 Dum ŝi iras, dum ŝi iras ŝi malgaje ploras:
 „Ĝemu, arbar', ĝemu, fratin', ambaŭ ni funebru!
 Vi — por via la verdaĵo, mi — por la junaĝo.
 Via verdaj', fratin'-arbar', baldaŭ reekĝermos;
 Mia junec', fratin'-arbar', neniam revenos.
 Vin tro frue, fratin'-arbar', prujno frostvelkigis,
 Min tro frue, fratin'-arbar', panjo edzinigis,
 Edzinigis, fratin'-arbar', al junul' petola,
 Kiu vagas dum la nokto tra vastaj kamparoj
 Kaj sin kaŝas dum la tago en profundaj valoj,
 Al mi venas nur vespere kaj donacojn portas,
 Al mi portas, fratin'-arbar', nur sangajn ĉemizojn,
 Nur ĉemizojn, fratin'-arbar', kaj hajdukajn kapojn.

Ĝemu, arbar', ĝemu, fratin', ambaŭ ni funebru!
 Vi — por via la verdaĵo, mi — por la junaĝo.
 Via verdaj', fratin'-arbar', baldaŭ reekĝermos,
 Mia junec', fratin' arbar', nemiam revenos.

Tradukis S. D.

Atentigo al niaj kunlaborantoj

Korekta lingvo¹⁾

En la aperintaj numeroj de B. E. en 1940 estas enlasitaj kelkaj lingvaj

¹⁾ Ni donas lokon al tiu ĉi artikolo por montri ekzemplon de memkritiko. Memkritiko estas bazo de ĉia progreso. La legantoj de B. E. estas insiste petataj komuniki al la redakcio siajn observojn, opiniojn kaj sugestiojn pri la plibonigo de la gazeto. Ni precipe atentigas niajn kunlaborantojn pri la granda ilia morala respondeco. Verkante aŭ tradukante ili ne ŝparu

eraroj, kiuj montras ian neglektemon al la lingva perfekteco kaj gramatikaj reguloj kaj same ian malzorgemon rilate al tempon kaj longe pripensadu siajn esprimojn, frazojn, vortojn ktp. La redaktoro tre ofte sin vidas devigita reverki tutajn frazojn kaj eĉ alineojn. Sed li ne ĉiam havas tempon tion ĉi fari kaj ofte publikigas la manuskripton je la respondeco de l'aŭtoro aŭ de la tradukinto.

N. D. R.

la bona korektado kaj revizio de la presataj artikoloj. Ĉio ĉi ne kontribuas por la lingva pliperfektigo de la bulgaraj esperantistoj kaj malbone prezentas nin antaŭ la alilandanoj.

Ni trarigardu la paĝojn de № 1. kaj № 2—3. de B. E. kaj trovu la plej tipajn erarojn, ordigante ilin en kelkaj paragrafoj.

1. igi — iĝi-eraroj.

La komenca frazo de la ĉefartikolo de № 1-a jam estas malkorekta: Nia nova asocia jaro jam delonge *komencis*. Oni komencas *ion*, kaj io *komenciĝas*. Do: la nova jaro *komenciĝis*. Kaj ni *voĉdaŭris* la nekonatan krion (№ 2—3, p. 3). Oni povus *daŭrigi* la krion. Entute tiu ĉi kunmetita vorto estas maltaŭga. La vidon *haltis* mi sur vin (p. 4). Halti estas netransitiva verbo, do: mi mem *haltas*, sed mi *haltigas* la vidon, t. e. igas ĝin halti. Miaj brakoj vin *levigis* (p. 5). Kontraŭe al halti—haltigi, ĉar levi estas transira verbo. Do—miaj brakoj *levis* vin. Laborestro nur povas *levigi* al siaj laboristoj ian ŝarĝon, t. e. igi ilin levi la ŝarĝon. La peza pordo *fermiĝis sin* (p. 5). Korekte: *fermis sin* aŭ nur *fermiĝis*. Mi *vekigis* lin (p. 6). Kiel supre — *vekis* lin, ĉar vekigi signifus: igi (iun) veki (aliulon). Per *terurigitaj* okuloj — sufiĉas: per *teruritaj* okuloj (p. 6). *Nebridigita* leonino (p. 7) — nur *nebridita*, ĉar la verbo estas bridigi, aŭ — *senbrida* leonino. Tiuj onidiroj *timis* ne malmultajn (p. 8.) t. e. *timigis* ne malmultajn, aŭ: tiujn onidirojn *timis* ne malmultajn. Ni iris kun B. *premintaj* unu al alia. Korekte — *premiĝintaj* unu al alia (p. 9). Tuj kiam ni ĝin *levigas* . . . (p. 9) estas nekorekta frazo, lingve kaj gramatike: *Щомъ го вдигнемъ*: tuj kiam ni ĝin *levos*.

2. Akuzativo-eraroj.

Po tri grandajn korbojn (№ 1-a, p. 5). Korekte estus sen akuz. finaĵo, ĉar antaŭstaras prepozicio *po*. Ĉesis je la 28-an de sept. (№ 1-a, p. 14), same, ĉar estas prepozicio *je*, la dato devas esti: 28-a de sept. Mi montras la eldonon de du albumoj *kiel ekzemlo* (№ 2, p. 1). Korekte: kiel ekzemplon, ĉar tiu ĉi vorto

estas komplemento, ne subjekto. Seme: la urbo kunplektadis siajn stratojn *kiel nigraj zigzagoj* (p. 5) anst. kiel nigrajn zigzagojn. Ĉiam, kiam la unua el la komparataj per vorteto *kiel* komplementoj estas en akuzativo, ankaŭ la dua akceptas akuzativan finaĵon, alie ĝi estus ne komplemento, sed subjekto. Ekz. Mi vidis min *kiel infano* (p. 5) antaŭ li — estas malkorekta, ĉar tiu ĉi frazo signifas ne ke mi vidis min kvazaŭ mi estus infano antaŭ li, sed: mi vidis min samkiel min vidus infano. Korekte: kiel *infanon*, aŭ pli bone: mi vidis min infano antaŭ li (sen *kiel* kaj sen akuz). Kaj neniun povis timigi *la feran sibladon* (p. 3). *La fera siblado* estas subjekto, do — sen *n!* Aŭ: neniun povis timi la sibladon. Ĉu vi memoras (la) *fajrego* (p. 5) anst. *la fajregon*. Nia paradizo daŭris nur unu nokton — *la nokto* antaŭ ol vi mortigu vian edzon (p. 6). Korekte: *la nokton* antaŭ ol vi mortigis vian edzon.

Estas troveblaj ankaŭ eraroj de akuzativo por direkto: levis ilin super *sia kapo* (№ 1-a, p. 3), anst. super *sian kapon*, ĉar estas direkto supren. Oni devas diri: *sidiĝi en sian apogseĝon* (sur p. 3-a erare sen akuz). La du usonanoj aperintaj *en lia kabineto* (p. 4), t. e. ili estis kaŝitaj en lia kabineto kaj simple *elsaltis* el sia kaŝejo. Korekte: *aperintaj en lian kabineton*, ĉar estas direkto *al* la kabineto kun prepozicio *en*. *Aperi al la blankan mondon*, tamen ne estas korekte, ĉar post prepozicio *al* (same post *ĝis*) ne estas uzata *n*-finaĵo. Do: *aperi al* la blanka mondo, aŭ: *en* la blankan mondon. Kaj mi eniris supren, *en la luma ĉambro* (p. 5), korekte: *en* la luman ĉambron, ĉar estas direkto *al* la ĉambro.

3. Infinitivo-eraroj.

Oni decidis la 17-a kongreso *okazi* en Loveĉ (№ 1, p. 7), tiu ĉi frazo ne estas bonstila. Korekte estas: oni decidis *ke* la 17-a kongreso *okazu* . . . Ĉu ni atendu *fini* la militon (№ 2—3, p. 1) — ĉu ni finos la militon? Oni diru: ĉu ni atendu, ke la milito finiĝu, aŭ — ke oni finu la militon, aŭ — ĉu ni atendu la militon finiĝi. Mi proponas tiun nokton ni ambaŭ *iri* (p. 8) t. e. *ke* tiun ĉi nokton ni ambaŭ

iru, aŭ: mi proponas ambaŭ iri tiun ĉi nokton (sen *ni*). La aŭtoro *lasis skribi* la nomojn (p. 12). Korekte: *skribigis* la nomojn (same kiel presigi, rimarkigi k. a.), aŭ simple: *skribis* la nomojn, se li mem faris la laboron. Tiu ĉi *lasis skribi* estas germanismo, ofte uzata de nordkaj okcident-eŭropaj esperantistoj. Similaj malkorektaj esprimoj estas ekz.: *Ŝi lasis sin kisi*, t. e. ŝi permesis al iu ŝin kisi; *ni ne lasu trompi nin*, t. e. ni ne lasu ke oni nin trompu.

4. Eraraj prepozicioj k. a. vortetoj.

. . . Troviĝis *sube* antaŭ la domo. *Sube* ne signifas *malsupre*, kaj oni devas diri — *malsupre* antaŭ la domo (№ 1, p. 4). Ne malpli *de* tri sek. (p. 4) anst. ne malpli *ol*. Komprenis *tiesan* deklamon (p. 10) — kial ne simple kaj belsone: *ties* deklamon? Mia mano enĉizis *en* ŝtona Enigmo la kvaropan Miraklon (№ 2—3, p. 3). Korekte estas: *en* ŝtonan Enigmon, aŭ *al* ŝtona Enigmo, ĉar el la ago rezultas io nova (ŝtona Enigmo), al kiu estas la direkto de la ago. Elmasoni *de* cemento (p. 3) anst. *el* cemento. Masonitaj de marmoro (p. 5 kaj 11) anst. *el* marmoro. Sangon mi verŝis *pri* vi (p. 6) — korekte: *pro* vi, *por* akiri vin. Kial trouzi per *je*: ekflustri *je* mia orelo (p. 8) anst. *ĉe*, *al*; la fenestroj similis *je* okuloj de kranio (p. 9) anst. *al*. Spite *de* la cirkonstancoj, ne tiel, sed — spite *al* la cirkonstancoj (p. 15).

5. Eraraj vortoj.

Deteni ĝin por si (№ 1, p. 3). *Deteni* — bulg. *въздържамъ*, kaj *задържамъ* estas *reteni*. Do: *reteni* ĝin por si. *Кожено кресло* estas *leda* brakseĝo, ĉar *felo* estas kruda best-haŭto kun la haroj (p. 3). Saltetis sur unu *kruro* (p. 4) anst. sur unu *piedo*. *Още сжщата ноцъ* ne estas tradukebla per: *ankoraŭ* la saman nokton (p. 3). *Ankoraŭ* havas en esp. du sencojn: oni ankoraŭ militas, t. e. ĝis nun aŭ ĝis difinita tempo kaj — ruiniĝos ankoraŭ kelkaj landoj, kie *ankoraŭ* esprimas ideon de io nove, ree, plue okazonta. Sed la bulgarismon — *още сжщата ноцъ*, *още сега* — oni traduku per *tuj* aŭ *jam*, ĉar tie ĉi *още* havas alian sencon, ekster la

diritaj du okazoj. *Korpremis* la manon de sia kolego (p. 5) — la verbo ne estas sukcese kunmetita; ĉar korpremo — korpremiĝo estas tute alio ol kora manpremo. Prof. Ch. mateniĝis super la ovo (p. 5). Korekte estus: *ĝismateniĝis* (*осъмна*), ĉar mateniĝi — bulg. *съмва се*. *Elŝeiĝo* de la ovo (p. 5) estas same neebla, ĉar nur la enhavo elŝeliĝas, kaj la ovo ĝenerale elkoviĝas. Kaj tamen — *bronitaj* aŭtomobiloj (p. 5) tute ne ekzistas, almenaŭ en esp. vortaro, ĉar bulg. vorto *броня*, en esp. estas *kiraso*. Do — kirasitaj aŭtomobiloj. Sendube ne: *ŝosejoj* (p. 14) sed *ŝoseoj*. Ankaŭ *kinematografejo* estas iom peza kun *ejo*, kvankam korekta, kaj la praktiko preferas: kinematografo, kino kiel fabriko, sed ne fabrikejo (p. 5). *Turni* la atenton (p. 1) ne estas bona esp. esprimo. Anst. ĝin uzu; altiri la atenton. Do: mi nun volas altiri la atenton de ĉiuj . . . *Okaze* ni interrenkontis nin (p. 4) t. e. *hazarde* (случайно), ĉar *okaze* signifas: dum aŭ pro ia okazintaĵo, *okaze* de la milito; estis foiro kaj osaze ni troviĝis tie. Cipresoj *ĉagrene* levis trunkojn (p. 6). Oni ĉagrenas iun per vorto, ago, sed tie ĉi plie konvenas ne *ĉagrene*, sed *malĝoje*; *malĝojige*, *triste*. La pantero per *flekseblaj* movoj *karesis sin* je mi (p. 6). La movoj estas *fieksiĝemaj*. Anstataŭ *karesis sin* je mi (p. 6) estus eble uzi: *karesumis* ĉirkaŭ mi (kiel amindumi ekz.). Ne: *misticismo* (p. 7), sed *mistikismo* (el mistika). Ne: *pretencoj* (p. 11), sed *pretendoj* (el verbo *pretendi*). Anst. *fini* iun lernejon (p. 7), oni diras ordinare — *absolvi*. Kaj tiu ĉi „amerikankoleĝo“ ŝajnas iom stranga (p. 14). *Restorejo* ne, sed *rectoracio*, ĉar ne estas radiko restori (№ 1, p. 5).

6. Eraraj frazoj.

La sekvontan tagon, forpelinte vin per mia rigardo de timanto, vi ne venis (p. 7). El la frazarango kompreniĝas, ke la subjekto „vi“ estas subjekto aŭkaŭ de la unua fraz-parto (propozicio), do—vi forpelinte vin ktp. Sed la senco estas alia: la sekvontan tagon, pro tio ke *mi* forpelis vin per mia rigardo — ktp. aŭ—post kiam mi forpelis vin—ktp. Nia hundo ek-

bojis, sed post kiam ekkonis min ktp. (p. 8), pli bone: nia hundo ekbojis, sed *ekkoninte* min . . . Iuj vidis noktomeze la maljunulon *ke vagas* (p. 8): la maljunulon *vaganta* aŭ la maljunulon *vagi*. J. P., sola skulptisto nia humoristo kaj karikaturisto (p. 11) estas same malkorekta esprimo. Korekte: J. P., sola skulptisto—humoristo kaj karikaturisto.

7. Aliaj eraroj.

Kunmetitaj vortoj kiel esperanto-asocio, esp.—kurso, esp.—movado k. a. estas skribataj kun kunliga streketo. Se ĝi mankas, evidentiĝas ke la skribanto ne scias kio estas adjektivo kaj kio substantivo, ĉar tiaokaze oni devis skribi: *esperanta* asocio, *esperanta* kurso, *esperanta* movado ktp. Tia eraro estas farita kelkfoje, ekz.

esp. ekzameno, esp. movado (№ 1-a, ĉefartikovo), esp. asocio (№ 1, p. 7; № 2, p. 17), esp. kursoj (№ 1, p. 7), esp. societo (№ 1, p. 15), esp. eldonejo (№ 2, p. 2).

La bulgara sono $\text{X}—\text{B}$ estas transskribebla per litero *â*, kiel troviĝas iuloke (Osâm, № 2—3, p. 13), sed plej ofte ne estas prizorgata: Sâglasie (№ 1, p. 7), Kazanlâško (№ 1 p. 14), Vâlkanov (№ 1, p. 15) — ĉiam la litero *ä*, kiu en neniu alfabeto sonas kiel niaj $\text{X}—\text{B}$.

Eraroj (ŝajne pres—) troviĝas same ĉe la fremdaj vortoj en la artikolo pri Turkujo (p. 14, № 2—3): Cünshuriyeti (Cümhuriyeti), Istanbul, (Istambul), Konstantinopolo (Konstantinoplo) kaj eble ankoraŭ.

D. Z. — Mitt.

VOJAĜOJ

Al la argentkoloro bordo

Balĉik!

La argentkolora bordo.

Kaj vere, la nomo estas tre sukcesa. Rokoj kun argentkolora cindro, sorĉaj bildoj, kaj en la malproksimeco la maro mistera, dubeblua kiel la ĉielo, ĉiam mal-kvieta, ĉiam ĝemanta, montriĝas subite, post longa vojo, el la verdaj senfinaj kampoj.

Tamen la tero tie ĉi estas fruktodona. Sen arbaroj, sen eksteraj signoj, krom la dezertaj vilaĝoj.

La vilaĝoj kun dometoj el krudaj ŝtonoj estas lokitaj ĉirkaŭ iu granda puto.

Subite, tute neatendite, la vojo mal-suprenigas sin en profundan krut-valeton — unu grandega abismo eltranĉita en la grizaj kaj blankaj rokoj.

Dekstre — la bulgara parto de la urbo: multaj ŝtonaj domoj, alte disiĝintaj sur la pinto de la monteto, kun ŝtuparaj vojetoj trapasantaj inter la muroj, kiuj ĉirkaŭbaras ĉiun korton. Kaj super ĉio, malnovaj putoj kun klara fonta akvo, apud kiuj venas la azenoj gvidataj de virinoj kaj infanoj.

La aŭtomobilo ĝemas kaj portas nin sur malebena strato. Kiom da ĉarmaj kaj strangaj lignaj dometoj! Kia grupo da dobruĝaninoj kun koloraj kostumoj venintaj enverŝi akvon de tiel majstre konstruita fontano!

T. Dobrev—Dobruĝanski

Dobriĉ

PROVERBOJ

Post vetero malbela lumas suno plej hela.
Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.
Espero kaj pacienco kondukas al potenco.
Kiu levis la piedon, devas ekpaŝi.
Kiu amas honoron amu laboron.

ЕДИНЪ ОТГОВОРЪ

Въ два броя на в. „Отечество“, органъ на Съюза на запаснитѣ офицери, г. Хаджидимиевъ, разглеждайки въпроса за масонството, споменава и есперанто като негова филиалка и му приписва нѣща, които не отговарятъ на истината.

Въ отговоръ на тѣзи обвинения нашиятъ дългогодишенъ есперантски деятель г. Стефанъ Радевъ излѣзе съ статья, която е помѣстена въ броя отъ 28. декември 1940. г. на сжщия вестникъ — „Отечество“. Тя представлява интересъ за нашия читателъ, а още повече, че е помѣстена въ официалния органъ на Съюза на запаснитѣ офицери. Ето защо ние я предаваме изцѣло.

„Въ своята статья „Франкмасонството“, печатана въ в. „Отечество“ отъ 30. ноемврий н. г., г. Хаджидимиевъ, старайки се да аргументира и илюстрира своитѣ мисли, казва, между другото: „ . . . всички масонски ложи, както и другитѣ масонски организации (Ротари интернационалъ, Имка, Пенъ-клубъ, Есперанто и др.) . . “. На лице е едно обобщение „на едро“, безъ необходимия и съответенъ анализъ. Колкото се отнася това до есперанто, като поддѣление или функционална проява на масонството, изхождамъ отъ положението, какво г. Хаджидимиевъ има предвидъ есперанто въ страната ни, българскитѣ есперантисти и, по-конкретно, Българския есперантски съюзъ и неговитѣ поддѣления. Защото, наистина, би било ненуждно и безъ интересъ да се занимаваме съ това — каква е една организация и каква е нейната роль вънъ отъ страната ни. Защото е ясно, какво г. Хаджидимиевъ цели озонирането и заздравяването на нашия общественъ животъ, на нашия народностенъ духъ. Противъ едно съобщение не може да не се реагира, тъй като най-малко българскитѣ есперантисти и тѣхната организация заслужаватъ да бждатъ поставяни тамъ, кждето нито сж били, нито сж, а и нито иматъ намѣрение да бждатъ. За избѣгване евен-

туални неточни заключения и наслоения необходимо е да бждатъ изтъкнати нѣкои положения, отнасящи се до есперанто въ страната ни.

Преди всичко Българскитѣ есперантски съюзъ нито е билъ, нито е каквото и да е поддѣление на която и да е международна есперантска организация. Наистина, той е билъ каненъ, той е билъ моленъ, но той винаги е отказвалъ това. Като така, Българскитѣ есперантски съюзъ е действувалъ и действува въ рамкитѣ на страната ни и то винаги съ огледъ интереситѣ на народа и страната ни. Никога той не е възприемалъ, не ще възприема и за въ бждеще внушения, идещи отвънъ. Той не е билъ нито въ материална, нито въ организационна, нито въ функционална връзка съ каквато и да е международна есперантска организация. Тукъ може да се добави, че има други организации, които се считатъ стопроцентово национални, когато тѣ фактически сж въ организационна връзка съ интернационални организации (Б. Н. С. Ф. — членъ на „Фифа“, Турингъ клубъ и пр.).

Българскитѣ есперантисти въ своето болшинство и Българскитѣ есперантски съюзъ винаги сж схващали есперанто като езиково срѣдство, като неуморно и безвъзмездно сж поставяли всѣкога и при всички случаи въ услуга на страната и на народа ни. Тукъ не е мѣстото да се говори, какво ние като малкъ народъ, езикътъ на който се говори едва отъ 7—8 милиона, не можемъ да не възприемемъ едно подобно езиково срѣдство, съ което да имаме възможността да запознаваме чуждия свѣтъ съ страната ни. Впрочемъ, тази именно цель е поставена недвусмислено и въ устава на Българския есперантски съюзъ, кждето въ чл. 2. т. „б“ се казва: „да запознава чрезъ езика есперанто външния свѣтъ съ историята и културата на българската земя, както и изобщо съ българската кауза, като девизътъ на съюза е „Чрезъ есперанто за

България“. И тази целъ именно се следва неотклонно.

Безспорно е, че и въ Българския есперенски съюзъ, както впрочемъ въ всѣка една организация въ страната ни, не всичко е идеално редно. Не можемъ да не се съгласимъ, че има нѣкои есперантисти, които употребяватъ есперанто като езиково сръдство за други цели. Обаче, отъ това би ли могло да се прави обобщение за есперанто и за есперанскитѣ организации въ страната ни? Това би значило да упрѣкваме и други, които употребяватъ други сръдства (езици, радио и пр.) за цели, стоещи извънъ интереситѣ на страната ни въ даденъ мо-

ментъ. Не сръдството е виновно, а онзи, който употребява сръдството. Обаче, българскитѣ есперантисти въ своето болшинство, както и ржководителитѣ на Българския есперантски съюзъ и на есперанскитѣ дружества въ страната ни изхождатъ единствено и само отъ интереситѣ на страната и народа ни, като едновременно удачно и навреме се справятъ съ онѣзи есперантисти, които излизатъ извънъ рамкитѣ на поставената целъ. По такъвъ начинъ въ есперантскитѣ организации има доста положителенъ, градивенъ елементъ, който съ успѣхъ би могълъ да бжде използванъ за благо и интереса на страната и народа ни“.

Изъ живота на Б. Е. С.

● Управителниятъ съветъ на Съюза въ заседанието си на 27 декемврий 1940 г. е избралъ за редакторъ на сп. „Bulgara esperantisto“ г. д-ръ Стоянъ Джуджевъ, вмѣсто подалия оставката си г. Ив. Сарафовъ. Взети сж всички мѣрки, щото презъ новата XXII-ра годишнина списанието да излиза най-редовно. Поканватъ се читателитѣ да подновятъ абонамента си и да подпомогнатъ издаването на списанието.

Anonco

Nederlandaj gesamideanoj volus korespondadi kun bulgaraj samideanoj pri ĉiu temo kaj ŝanĝi bildgazetojn kaj poŝtmarkojn, certe respondos.

Adreso: G Ouweneel
v Zeggelenstraat № 3
Haarlem
Nederlando

● Дългогодишниятъ есперантски деятель и отличенъ есперантистъ отъ Русе г-нъ Владимиръ Георгиевъ е подарилъ на Русенското есперантско д-во „Solidageco“ голѣмъ брой интересни и ценни книги и списания, повечето отъ които подвързани. Направениятъ даръ представлява не само голѣма придобивка за библиотеката на д-вото, но е и отлично помагало за новитѣ идващи есперантисти, които ще го използватъ за обогатяване своитѣ познания и за усъвършенствуване на езика. Постжпката на г-нъ Георгиевъ е единъ добъръ примѣръ на по-старитѣ есперантисти, които иматъ възможность да отдѣлятъ часть отъ своитѣ частни есперантски библиотеки и да направятъ подобни дарове на мѣстнитѣ есперантски дружества. Хвала на съидейника Владимиръ Георгиевъ.

● Свикали сж годишнитѣ си събрания и сж избрали нови настоятелства следнитѣ дружества:

Есперантското културно-просвѣтно дружество „Mondamikeso“ въ Чирпанъ; председателъ: — Петъръ Вълкановъ,

подпредседателъ — Панайотъ Касъмовъ, секретаръ — Димитъръ Бунарджиевъ, касиеръ — Спасъ Стефановъ и съветничка — Машина Хр. Данчева.

Есперантското културно-просвѣтно д-во въ Панагюрище: председателъ — Петко Петковъ, секретаръ — Атанасъ Маджриовъ, касиеръ — Иванъ Гарчевъ, членове — Ана Чочева и Петко Гоневски.

Есперантското д-во въ София: председателъ: — Стефанъ Ганчевъ, подпредседателъ — Иванъ Котовъ, секретаръ касиеръ — Кирилъ Дражевъ и съветници — Сл. Колевъ и Л. Бъчварова.

Есперантското д-во „Esperanto“ — Плѣвненъ: председателъ — Георги Цвѣтковъ, подпредседателъ — Любенъ Маркиновъ, секретаръ — Гено Цоловъ, касиеръ — Елза Сл. Иванова и библиотекаръ — Вѣрка Петрова.

Есперантското д-во „Radio“ — Пазарджикъ: председателъ — Иванъ К. Василевъ, подпредседателъ — Василь Лазаровъ, секретаръ — Янко Г. Яневъ, касиеръ — Сотиръ К. Василевъ и домакинъ библиотекаръ — Жакъ Бехаръ.

Есперантското д-во „La verda kavaĵo“ — с. Млѣчево, ок. Севлиевска: председателъ — Иванъ В. Гължбовъ, секретаръ — Илия Мих. Илийчевъ и касиеръ — Колю Енчевъ Колевъ.

Културното просвѣтно благотворително д-во „Albatro“ — Варна: председателъ — Георги Хр. Димовъ, подпредседателъ — Вѣра К. Македонска, секретаръ — Веска Д. Сколуфанова, касиеръ Мара Г. Саралиева и домакинъ-библиотекаръ — Диаманди Вангеловъ.

Есперантското д-во „Kulturo“ — Пловдивъ: председателъ — Запрянь Запряновъ, секретаръ-касиеръ — Ангелъ Шишковъ, библиотекаръ — Иванъ Батклиевъ, членове — Димитъръ Грамадниковъ и Златю Димитровъ.

Есперантското д-во „Lumo“ — гара Искъръ: председателъ — Владо К. Георгиевъ, секретаръ — Йорданъ Ст. Димитровъ, касиеръ — Стоянъ Л. Цвѣтковъ, съветници — Радка Г. Атанасова и Маргарита Д. Русева.

На избранитѣ настоятелства на горнитѣ д-ва Управителниятъ съветъ пожелава ползотворна дейность.

● Пазачътъ на хижата „Черни връхъ“ — Георги Ивановъ, познатиятъ на всички софийски туристи Гошо, се е заловилъ да учи есперанто. Той е събралъ почти всички ръководства отъ български автори: Ада, Асенъ Григоровъ, Захари Захариевъ, Емилъ Стратевъ и Димитъръ Ивановъ. Гошо не е знаелъ до сега, че между туриститѣ и скиоритѣ има и есперантисти, които, при своитѣ посещения на хижата биха могли да му обяснятъ нѣкои нѣща относно есперанто. Той моли всички есперантисти, които посещаватъ Черни връхъ да му се обаждатъ като на samideano. Гошо си е поставилъ за целъ да посети предстоящия конгресъ на българскитѣ есперантисти, да стане членъ на Софийското есперантско дружество и да се абонира за „Bulgara esperantisto“. Желателно е, щото софийскитѣ туристи — есперантисти да занесатъ на хижата есперантски книги, необходими, както за Гошо, тъй сжщо и за другия есперантистъ на Черни връхъ — командированя тамъ кандидатъ подофицеръ Иванъ Илиевъ Вълчевъ, наблюдателъ на хижата.

Набавете си брошурката
**СЖЩНОСТЪ, ПРОИЗХОДЪ И
РАЗВОЙ НА ЕЗИКА**
отъ Вили Розевъ

Популярно изложение на най-новитѣ изследвания въ езиковата наука
Произходъ на езика отъ колективния трудъ на първобитнитѣ хора. — Сжщность на езика като сръдство за организиране труда и производството. — Пжтища на езиковото развитие: диференциация и интернационализиране на езицитѣ. — Международнитѣ езици на миналото и всемирниятъ езикъ на бждещето.

Цена 6 лева. На настоятели
15% отстжпка.

Доставя

Витали Юлзари
ул. Зл. Георгиевъ № 8 — Варна

NIA VIVO


• Laŭ invito de la loka urba legejo „Nadeŝda“ en Târnovo, nia samideano Ivan H. Krestanov el Sofia paroladis la 9-an de dec. pri la glacia-fajra insulo *Isla n d o*, montrinte 120 lumbildojn pri tiu stranga lando de kontrastoj, kaj la 10-an de dec. pri la sunplena insulo *Malta*, la pomo de la malpaco en Mediteraneo, montrinte 60 lumbildojn. La paroladisto ne preterlasis mencii, ke dum liaj longaj vojaĝadoj en la fabela nordo, li ĉie trovis esperantistojn, kiuj frate lin helpis. Cetere ankaŭ en siaj oftaj artikoloj en la ĉefurba tagĵurnalo *Mir*, li akcentas la utilon de esperanto. La sama samideano paroladis ankaŭ en la loka knaba gimnazio pri la utiloj de fremdaj lingvoj kaj esperanto. Dankis al

li en esperanto Fino Nadeŝda Denikova, profesorino de latina lingvo kaj gvidantino de la lernanta esp. grupo, kiu lastatempe malfermis kurson de esperanto.

• La konata ĉefurba ĵurnalo „*Mir*“ en la artikoloj de sia korespondanto kaj nia samideano Iv. H. Krestanov ofte mencias la servojn de esperanto dum liaj multaj vojaĝoj.

• En la ĵus aperinta 80-paĝa libreto „*Sborniĉe Kultura*“ por 1941 estas inter la multaj interesaj artikoloj sciencaj kaj literaturaj ankaŭ artikolo „*Младежъта и есперанто*“ (La junularo kaj esperanto) de nia samideano Iv. H. Krestanov.

• En v. Sadovo—Plovdiva regiono, aperas ilustrita revuo „*Селски подемъ*“ (Vilaĝa leviĝo) kiu komencis publikigi en sia III-a jaro (1941) rubrikon: „*Esperanto-paĝo*“, redaktatan de nia kunlaboranto Iv. H. Krestanov.



КНИЖАРНИЦА „БРАТСТВО“ СЕВЛИЕВО

пощ. чек. с-ка 2201

Доставя :

Пълень Есперанто-български речникъ отъ Ат. Николовъ, необходимостъ за всѣки български есперантистъ. Цена 80 лв.; подвързанъ 100 лв.

Учебникъ по есперанто отъ д-ръ Захариевъ съ 316 картини въ текста. Лесна и практична метода за изучаване на есперанто съ системно подредена граматика. Цена 20 лв.

Практична граматика на есперанто отъ Емилъ Станевъ, необходимо помагало за всѣки есперантистъ. Цена 6 лв.

Картички за кореспонденция съ дика на д-ръ Л. Л. Земенхофъ и химна на есперанто 10 броя 4 лв.

Картички за кореспонденция (два вида) трицвѣтенъ и двуцвѣтенъ печатъ, 10 броя 15 лева.

Залепки за кореспонденция (glumar-koj) 5 вида 100 броя.

Портрета на Земенхофъ, голѣмъ форматъ (33×27 см.) художествена изработка. Цена 5 лева.

Есперантски значки — зелена звезда на бѣло поле. Цена 10 лева.

Зелена звезда съ изрѣзани краища. Цена 8 лева.

Есперантски синтаксисъ отъ д-ръ Зах. Захариевъ, намалена цена 10 лв.



Nekrologio

La 8-an de januaro mortis Radî P. Balkanĝiev — patro de nia samideano kaj malnova senlaca esperanto-pioniro Stefan Radev. Niajn kondolencojn.



Още не е късно да си набавите художествения стененъ трицвѣтенъ календаръ „**ЕСПЕРАНТО**“. Всѣки есперантистъ трѣбва да го притежава. Изпраща се срещу 5 лв. въ марки. За поржчки отъ 10 екз. нагоре 20% отстъпка.

Пристигнаха **нови есперантски значки**.

Малъкъ форматъ, съ хубавъ емайлъ кржгли 20 лева.

Срѣденъ форматъ, съ хубавъ емайлъ и **Е** въ срѣдата, кржгли 22 лева.

Поржчки при „**СПИКТУР**“ институтъ — 20, ул. Царъ Калоянъ — София.

Суми се превеждатъ чрезъ пощ. чекова смѣтка № 3616 или чрезъ пощенски или гербови марки.

